

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (932) • 2018 •



Ekumena Esperanta Kongreso 2018, Poděbrady



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Ni ĉiuj ricevis la saman akvon	99
Ilona Koutny – premiito de FAME-kulturpremio	102
Raporto pri la ekumena kongreso	103
Protokolo de KELI-jarkunveno	109
Letero de Hieronimo – daŭrigo	111
Du trezoroj surretaj	115
Aliĝilo por la kongreso 2019	116
Diversaj kulturoj en paca harmoni'	120

Redaktoraĵoj

En tiu ĉi numero vi legas raporton pri la ĉi-jara ekumena kongreso. Iom post iom mi publikigos prelegojn kaj predikojn faritajn dum la kongreso. Multaj gefratoj partoprenis, vidu la fotojn ĉi-numere. Tiuj kongresoj kaj renkontiĝoj kun gefratoj estas tre inspirigaj.

Sed tempo pasas kaj ni jam devas plani por la sekvontjara kongreso. Ĉi-numere vi trovas ankaŭ aliĝilon por la kongreso 2019, kiu okazos apud la lago Balatono en Hungario. Espereble multaj trovos la eblecon partopreni. Aliĝu jam nun!

En tiu ĉi numero vi legas ke prof. Ilona Koutny estis premiita per la FAME-kulturpremio. Ŝi gvidas universitatan postdiploman programon en kiu ankaŭ mi partoprenis. Inter multaj gravaj kursoj troviĝis kursoj pri la diversaj epokoj de esperanta literaturo. Tiuj kursoj devigis nin legi klasikajn kaj modernajn librojn, poemojn kaj prozaĵojn. Komprenoble mi ne legis ĉion kun sama intereso, sed tamen tiuj studoj montris nian literaturan riĉecon. Legu pli!

Ni ĉiuj ricevis la saman akvon

Ekumena Kongreso, Poděbrady, 2018

Philippe Cousson, FR

Karaj gefratoj en Kristo, karaj geamikoj,

dum ĉi tiu kongreso ni volas stampi du datojn, eĉ tri.

Antaŭ cent jaroj, du eklezioj en ĉi tiu lando [Ĉeĥio], posteuloj de Jan Hus, Petr Chelčický, Martin Luther, Jean Calvin, Jan Amos Komenský, kaj multaj aliaj, decidis ke pli da aferoj kunigas ilin ol kiuj disigas ilin. En la ĵus renaskiĝinta ŝtato, ili decidis unuiĝi kaj ekestis en 1918 la Ĉeĥfrata Evangelia Eklezio. Tiu eklezio, kiel aliaj postaj samaj en aliaj landoj, apartenas al ambaŭ konfesiaj internaciaj unuiĝoj, luterana kaj reformita. Eblas atesti kune pri la Evangelio eĉ se oni ne ekzakte dividas dogmojn. Eblas preterpasi dogmatikon por vivi kristanan fidon.

Antaŭ kvindek jaroj, du esperantistaj ligoj, posteuloj de Émile Peltier kaj Paul Hübner, Aleksandro Dambrauskas kaj Friedrich Schneeberger, Max-Josef Metzger kaj John Cyprian Rust, decidis kune kongresi en Germanio, en Limburg a/d Lahn. Tiu paŝo al ekumenismo estigis kaj riproĉojn, foje akrajn, de ambaŭ flankoj, kaj sinsekvon de multaj aliaj ekumenaj kongresoj, nun la 22a, kiuj elmontris ke la gefrateco en niaj

kristanaj esperantistaj medioj ne plu dependas de la dogmoj, sed de tiu nia komuna Sinjoro, fonto de nia fido, kiu provizas al ni la vivan akvon.

Post Paul Wattson kaj Paul Couturier, antaŭ kvindek jaroj same, ekestis la komuna preparo de la Preĝsemajno por la Unueco de la Kristanoj. Iniciato unue katolika de Paul Wattson, malfermita al la aliaj de Paul Couturier, ekde 1968 ĝi estas kune pretigita de la Ekumena Konsilantaro kaj de la papa konsilantaro por Unueco.

Jam de kelkaj kongresoj ni uzas diversmaniere tiujn tekstojn.

Por pritrakti mian temon, mi uzos tri el tiuj tekstaroj.



En 2002, la temo estis "la fonto de vivo".

Mi citas el la tujara broŝuro.

"La temo de la Preĝsemajno por la Unueco de Kristanoj 2002 "Ĉar ĉe vi estas la fonto de vivo" (Psa 36: 9) sugestas, ke por penetri tiun sekreton ni devas malkovri la vojon al la fonto de la vivo. La simbolo de la fonto memorigas nin, ke necesas reiri al la origino, al la principo, al la radikoj, al la esenco. Por kune paŝi, la kristanoj devas sin apogi sur la Vorto de Dio, sur la malkaŝo de la vizaĝo de Dio en Jesuo Kristo, sur la renoviga forto de la Spirito de Dio kaj sur la kono pri la amo de Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito. Sen la lumo de la fonto de ĉiu lumo, la problemoj, kiujn ni renkontas sur nia vojo, restas ĉirkaŭitaj de mallumo kaj fariĝas stumbliloj. La fonto estas bildo de la akvo, kiu abunde fluas. Ni konas la simbolan kaj teologian riĉecon de akvo en la Biblio, de Genezo ĝis Apokalipso. Akvo donas vivon kaj purigas. Fido, preĝo kaj komuna agado povas igi akvon flui eĉ el la sekegaj rokoj de amareco kaj forlavi la pekon de divido ene de Kristanismo."

La preĝsemajno en 2002 estis pretigita de Eŭropanoj. La sekvo de la teksto aludas al Galatoj 3:27 : "*Ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston*". Ni baptiĝis en la saman akvon, por surmeti la vivan akvon, nome Kriston.

En 2015, kiam ni pasintfoje kongresis kune, en Strasburgo, la temo estis laŭ Johano 4:7 : "Jesuo diris al ŝi : Donu al mi trinki". En la teksto de la Evangelio, Jesuo diras al la Samarianino en

versiklo 10 : "*Se vi sciis la donacon de Dio, kaj kiu estas tiu, kiu diras tion al vi : Donu al mi trinki, vi petus lin, kaj li donus al vi vivan akvon.*" Jesuo estas tiu, kiu provizas al ni ĉiuj la saman vivan akvon, kaj tiu, kiu trinkas el tiu viva akvo, tiu neniam soifos. Kaj la akvo, kiun li donas al ni, fariĝos en ni fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo. Jes tiu akvo kiun li donas al ni estas la sama.

La ĉijara temo de la Preĝsemajno, do post 50 jaroj, daŭre parolas pri la unueco de la Eklezio de Kristo, laŭ la vidpunkto de liberigo en la preparo de la loĝantoj de la Karibeaj insuloj, sed ĝi ne rilatas al la akvo. Kvankam... la referenca teksto estas la kanto de la ĵus liberigita popolo post la trapaso de la maro, kie pereis la premintoj Egiptaj. Kaj trapasi maron havas ege grandan rilaton al akvo.

Por esti liberigita, la popolo devis transiri la maron, pasi inter la akvaj muroj, kun la firma espero pri posta bona estonteco ĉe la alia flanko, pri estonteco de vivo, de libera vivo. Tra akvo ili eniris en la vivon apud Dio.

Kaj tio estas bona bildo de la bapto. Tra tiu viva akvo mortas la malnova homo, pereas la peko kaj malfermiĝas la vivo.

Kiel la popolo Izraela trapasis la saman maron, ni trairis la saman bapton akvon por ricevi la saman liberigon, por vivi el la sama espero, por eniri en vivon de libereco en Kristo helpe de la Spirito.

Resume ĝis nun, nia ĉi-jara kongreso ekumena rememorigas al ni tri eventojn en la historio de kristanismo, unu loka,

la unuiĝo de du antaŭaj eklezioj, kiuj montris la vojon al aliaj, unu movada, nia unua ekumena kongreso, kaj unu pli tutmonda, la komuna preparo de la preĝsemajno.

Mi daŭrigas pluirante en tiu fadeno de la akvo per kelkaj aliaj bibliaj tekstoj, kiujn vi eble jam bone konas.

En la 55a ĉapitro de la libro de la profeto Jesaja : *"Ho vi, ĉiuj soifantoj, iru al la akvo."* Aŭ en la 42a psalmo : *"Kiel cervo sopiras al fluanta akvo, tiel mia animo sopiras al Vi, ho Dio. Mia animo soifas Dion, la vivantan Dion."*

Ni ĉiuj baptiĝis en la saman akvon, sed ĉu ni daŭre soifas la vivan akvon ? Ĉu ni daŭre soifas la vivantan Dion ?

Al kiu akvo ni iru ? En kiu fluanta akvo ni trinku ? Al tiu nia komuna akvo. Al tiu sama vivakvo.

La akvo de la savo estas sama. Ĝi estas unu.

Paŭlo, en sia unua epistolo al la Korintanoj rememorigas al ni kelkajn epizodojn el la periodo de la popolo en la dezerto. Mi jam menciis la traŭradon de la maro. La apostolo aludas ankaŭ al la manao. Sed mi volas nun paroli pri fonto de vivo, pri la roko el kiu fluis akvo por la soifanta popolo, tiu roko kiun li devis frapi en Eliro 17 aŭ al kiu li devis paroli en Nombroj 20. Tiu roko estas, laŭ Paŭlo, Kristo mem, kiu sekvis la popolon. Kristo estas ja nia firma roko, sed li estas ankaŭ tiu roko el kiu fluas la vivakvo, sama por ĉiu kristano. Ne ekzistas pluraj rokoj, al ĉiu konfeso la propra, sed unu sola, Kristo mem. El tiu solas fonto venas unu sola sama akvo,

kiu devas poste elflui el la trinkantoj, kiel atesto de la savo de Dio. Ni do vivas el unu sama akvo, kiu venas el unu sama roko, kaj kiun ni devas disfluigi el ni kiel unu sola vivakvo.

La unueco de la kristanoj havas kiel originon la unuecon de la fonto. Tiu estas Kristo. La akvo kiun li provizas estas la vivakvo, la sola vivakvo, la sama vivakvo por ĉiu kristano.

La kristana bapto estas en akvo. La kristana bapto ĉiam estas laŭ la ordono de la Sinjoro. Ĝi okazas en la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito. Atentu pri tio, kion ni legas : mi ne diris : en la nomo de la Patro kaj en la nomo de la Filo kaj en la nomo de la Sankta Spirito. Mi uzis singularon : en la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito. Unu sola nomo por unu sola Dio en tri personoj.

Kiel estas unu sola Dio, estas la bapto per unu sama akvo.

Kiel cervo sopiras al fluanta akvo, nia animo sopiru al la vivanta akvo kiun povas provizi nur Kristo. Kompreneble, ne vendebblas en boteletoj tiu akvo. Temas pri spirita akvo, tamen reala. La animo kiu soifas sensoifiĝas per tiu akvo spirita. Venu al la akvo, la vera sola sama akvo, el la fonto kiu estas Kristo, venu tiu kiu soifas.

Ĝis nun mi parolis pri akvo de vivo kiun oni trinkas, en kiu oni baptiĝas. Nun mi volas rememorigi alian akvon de vivo, kiu aperas en du lokoj en la Biblio. Ĝi aperas en granda kvanto kaj venas el la Templo, el la trono de Dio mem. Ĝi

estigas vivon kaj resanigon. Oni povas legi pri tiu rivero en Apokalipso 22 kaj en Jeĥezkel 47. El ĝia akvo kreskas arbo aŭ arboj, resaniga arbo de vivo, kiu portas regule multajn fruktojn, akvo kiu eĉ resanigas la maron mem.

Ĉu Jesuo ne diris ke tiu kiu trinkos el lia fonto, el li fluos riveroj de vivakvo?

Ĉu ni ne ricevis kaj ricevas tiun ĉi unu spiritan akvon de la unu sola fonto? Mi kredas ke jes. Ĉu ni vere fariĝis mem fonto de vivakvo kiu fluas el ni? Ĉu nia vivo forportas la vivakvon ĉirkaŭ ni? Tio estas nia respondeco.

Laŭ la spuroj de tiuj kiuj volis ke estu videbla la sama akvo kiun ili ricevis, ĉu en la kuniĝo de la Ĉeĥfrata Evangelia Eklezio, ĉu en la Ekumena Esperantista agado, ĉe en la tutmonda Preĝsemajno, ni ĉiuj, ĉiu el ni, iru por trinki el la unu fonto por ne plu spirite soifi, kaj ankaŭ por esti preta fariĝi fonto de vivakvo por resanigo kaj vivigo en la mondo.

Tie atendas nin nia Sinjoro.



Profesoro Ilona Koutny ricevis FAME-kulturpremion

(Pli da informo ĉe <https://edukado.net/novajhroj?id=765> kaj http://pola-retradio.org/2018/10/e_elsendo-el-la-09-10-2018/)

Multaj certe konas aŭ aŭdis pri Ilona Koutny, kiu dum la lastaj 20 jaroj gvidis la Interlingvistikajn Studojn ĉe la universitato en Poznań. La studoj estas prestiĝa 6-semestra post-diploma kursaro. Tiujn studojn sekvas gestudentoj el la tuta mondo, kiuj renkontiĝas dufoje jare en Poznań por ĉe-lokaj prelegoj. Ankaŭ mi sekvis ilin, kaj feliĉe kaj sukcese ekzameniĝis pasintjare. Kun granda ĝojo mi eksciis ke profesoro Ilona Koutny nun en 2018 estis la premiito de la FAME-premio. Tiun premion oni aljuĝas por distingi personojn aŭ organizojn, kies plurjara engaĝo antaŭenigas internacian kompreniĝon.

La transdono okazis la 20an de oktobro 2018 kadre de granda kaj solena festo en la urbodomo de Aalen. La premion transdonis al Ilona la urbestro Thilo Rentschler kaj la prezidanto de la FAME-Fondaĵo Andreas Emmerich. La laŭdparoladon faris Peter Zilvar el Herzberg.

Gratulojn!

/Bengt Olof Åradsson



Foto: Edukado.net

Raporto pri la ekumena kongreso 2018

Poděbrady, Ĉeĥio, inter 6-13 de aŭgusto

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Ĉi-jare Pavel POLNICKÝ denove invitis nin al sia belega urbeto Poděbrady, kie KELI antaŭ kelkaj jaroj jam havis tre bonan kongreson, do kun ĝojo ni iris tien ankoraŭfoje – nun kune kun niaj katolikaj gefratoj.

Nia kongresejo estis agrikultura mezlerneja studenthejmo. Plejparte la partoprenantoj ankaŭ dormis tie (kelkaj de ni en du aliaj, proksimaj ejoj), ni manĝis en manĝejo kaj tie estis granda salono, kie ni preĝis kaj ankaŭ aŭskultis la prelegojn.

Plej ofte ni sekvis la kutiman horaron: matene ni komencis per matenpreĝo/meso, poste matenmanĝo, kantado, kiun sekvis prelego(j), post la tagmanĝo denove prelego(j) aŭ alia

programo, la verspermanĝon sekvis alia programero kaj ni fermis la tagon per vesperpreĝo.

LUNDE

Laŭ la informoj ni facile trovis la kongresejon, kien post longa-mallonga vojaĝo ni ĉiuj en ordo alvenis. Post la vespermanĝo ni fermis la tagon per vesperpreĝo, kiun mi (Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS HU) faris.

MARDE

Post la matenpreĝo, kiun gvidis Bengt Olof ÅRADSSON SE ni matenmanĝis. Poste ni kantis per la ĉiame afabla helpo de Ernst LEUZE DE kaj Agneta JÄRLSTRÖM SE.

Manĝejo /VP



Oficiala malfermo
/VP

La oficiala malfermo estis vere festa; venis la urbestro, la direktorino de la agrikultura mezlernejo, kiu gastigis nin, kaj la predikanto de Eklezio frata, kiuj per ĉarmaj vortoj bonvenigis nin. Al tiuj vortoj respondis la prezidantoj de niaj du organizacioj, do Giovanni DAMINELLI IT, prezidanto de IKUE kaj Philippe COUSSON FR, prezidanto de KELI. Ferme ni kantis la Esperanto-himnon de Zamenhof.



E. Leuze kaj A. Järström /VP

Antaŭ la tagmanĝo ni aŭskultis du inaŭgurajn

prelegojn. Unue Philippe COUSSON parolis pri la kongresa temo: *Ni ĉiuj ricevis la saman akvon* (Agoj 21,9), poste Marija BELOŠEVIČ HR havis prelegon per la titolo: *50 jaroj de E-ekumenismo*.

Post la tagmanĝo, en du grupoj ni promenante trarigardis la urbo-centron de Poděbrady.

Dum la posttagmezo niaj katolikaj gefratoj havis meson, kaj KELI-anoj partoprenis diservon, kiun gvidis Pavel KLIMEŠ CZ.

Post la vespermanĝo ni havis tre bonetosan interkonan vesperon, kiun ordigis Samuel GAILLARD FR. En 5-6 personaj grupoj ni konatiĝis unu kun la aliaj – ofte estis la salono laŭtega pro la multaj ridoj.

Ni fermis la tagon per la vesperpreĝo, kiun ĉi-foje gvidis Philippe COUSSON.

MERKREDE

Ni komencis la tagon per la matenpreĝo de Siegfried KRÜGER DE.

Poste ni havis tut-tagan ekskurson en du grupoj. Tiuj, kiuj antaŭe ne estis jam en Poděbrady, do plejparte IKUE-anoj, iris al Kutná Hora, kaj ili havis ankaŭ meson en Kolín. Aliaj, do plejparte KELI-anoj vizitis unue



M. Belošević /VP



P. Klimeš /VP



Ĉe la ĉevalbredejo /REA



ĉarman kastelon el la 18a jarcento (Zámek Karlova Koruna) en Chlumec nad Cidlinou. Post bongusta tagmanĝo ni iris al tre interesa loko, al ĉevalbredejo en Kladruby nad Labem, kie oni jam pli ol cent jarojn laboras kaj liveras belegajn ĉevalojn inter alie al reĝaj familioj preskaŭ ĉie en Eŭropo. Per la afabla permeso de nia tre lerta loka ĉiĉerono ni ankaŭ havis eblecon viziti ilian malgrandan sed riĉan preĝejon.



Post la vespermanĝo ni aŭskultis du prelegojn pri novaj libroj en esperanta lingvo. Pri religiaj libroj rakontis al ni Marija BELOŠEVIČ, pri diversaj aliaj libroj Petr CHRDLÉ CZ.

A Järllström, R Pospíšilová, P Polnický, P Klimeš /VP

La vesperpreĝon en tiu ĉi vespero faris ukraina ortodoksa pastoro, la IKUE-ano Sergij PRUDKO.



ĴAŬDE

La tago komenciĝis per meso kaj per matena preĝo, kiun gvidis Philippe COUSSON, kaj per kantado.

La kutima ĵaŭda programo de niaj kongresoj estas la jarkunvenoj de niaj organizaĵoj, tiel okazis ankaŭ ĉijare. Vi povas legi la protokolon de tiu ĉi kunveno en la tiu ĉi numero de Dia Regno.

Post la tagmanĝo ni povis aŭskulti kvar interesajn prelegojn.

S. Prudko /BĀN

Unue Marija BELOŠEVIČ parolis pri la titolo: *Ekumenismo en la Katekismo de Romkatolika eklezio*. Poste Oldřich A. FISCHER CZ parolis pri *la Biblio de Kralice*, kiun sekvis la prelego de Petr CHRDLÉ pri *J. A. Komenio kaj L.L. Zamenhof – simileco de iliaj vivomisioj*. Fine Endel OJASILD EE rakontis al ni pri *Estonio: lando, historio kaj naturo*.

Post la vespermanĝo per la helpo de belaj kaj interesaj fotoj Wolfram ROHLOFF DE kunportis nin al malgranda vilaĝo de Nova Gvineo, kie li vivis kaj laboris dum duonjaro kune kun sia edzino kaj filinoj.



Unu el la urbpromenantaj grupoj /VP

Ni fermis la longan tagon per la vesperpreĝo de Anna kaj Mats LANDFORS SE.

VENDREDE

La matenpreĝon faris Wolfram ROHLOFF, kiun sekvis matenmanĝo kaj kantado.

Antaŭ la tagmanĝo ni aŭskultis la prelegon de Kreŝimir BELOŠEVIČ HR pri *praktikado de ekumenismo en Zagrebo*. Poste Philippe COUSON parolis pri la *unuigintaj eklezioj en Francio*.

Posttagmeze ni ekskursis al Rožd'alovice, kie unue ni vizitis belan barokan preĝejon, poste ni iris al loka metiisto, librobindisto. Jam la kvara generacio posedas la metiejon en la sama loko, kaj ĝis hodiaŭ ili laboras (ankaŭ) per la belaj, malnovaj maŝinoj.

Post la vespermanĝo ni havis specialan vesperon: kongresanoj sin prezentas!

Samuel GAILLARD bone organizis ĉion kaj la kongresanoj estis tre aktivaj, do ni povis ĝui vere varian programon: kantojn, poemojn, muzikadojn, teatraĵetojn, ktp.

Je la fino la gefratoj BELOŠEVIČ surprize regalis nin per bongustaj kroataj kukoj kaj trinkaĵoj.

La tago finis per la vespera preĝo, kiun gvidis Václav POSPÍŠIL CZ.

SABATE

La tago komenciĝis kutime: meso kaj matena preĝo, matenmanĝo kaj kantado.

Poste Petr CHRDLÉ havis tre interesan prelegon pri *la vivo kaj la verkoj de Francisko Valdomiro LORENC*. Tiun sekvis la prelego de Marija BELOŠEVIČ pri Papo Francisko kaj ekumenismo.

Post la tagmanĝo mi (Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS) prelegis pri la apostoloj kaj iliaj atributoj, tuj poste ni iris al la preĝejo de evangelika eklezio, kie ni havis belan koncerton. Kun orgen-akompano kantis al ni

A. kaj M. Landfors /BÁN



W. Rohloff /BÁN



P. Chrdle kaj
J. Studény
/VP



H. Caysac /VP



E. Leuze ludas dum ekskurso /REA



Bibliajn kantojn de Antonín DVOŘÁK. Richard HAAN solisto de ŝtata operejo en Praha, kaj ankaŭ lia edzino Jolana HAAN-SMYČKOVÁ, filino de multaj el ni konata operkantisto Miroslav SMYČKA.

Vespere ni en malgrandaj grupoj studis Biblion laŭ tekstoj por la preĝsemajno, poste Marija kaj Krešimir BELOŠEVIĆ faris la vesperpreĝon.

V. Pospíšil, A. Ráczkevy-Eötvös, P. Chrdle /BÁN



DIMANĈE

La matenan preĝon faris Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, poste kiel kutime okazis matenmanĝo kaj kantado.

Poste niaj katolikaj gefratoj veturis buse al meso, aliaj aŭskultis la prelegon de Pavel KLIMEŠ pri la centjara datreveno de la Ĉeĥofrata evangelika eklezio.

Poste ni havis interparolon, diskutrondon pri la estonteco de KELI.

Posttagmeze ni havis komunan ekumenan diservon en la preĝejo de la Ĉeĥofrata evangelika eklezio dum kiu predikis Philippe COUSSON, Pavel KLIMEŠ kaj Sergij PRUDKO, legis la tekstojn Pavel POLNICKÝ kaj Pavol PETRIK SK, orgenludis Ernst LEUZE.

Post paŭzo (kiu taŭgis por glaciaĵ-manĝi aŭ kaftrinki en la proksima urbcentro) en la sama preĝejo ni havis bonegan koncerton de la koruso Sankta Cecilio.

Ili ravis nin per ilia altnivela kaj varia programo, plurfoje ili devis pli kaj pli kanti, ĉar per fortega aplaŭdo la publiko ne permesis ilin forlasi la scenejon.

Post la vespermanĝo okazis la kutima last-vespera programo: distra, adiaŭa vespero – ni havis longan, sed tute ne enuigan vesperon! Multajn interesajn kaj ĉarmajn programerojn prezentis multaj kongresanoj, kaj Samuel GAILLARD denove bone kunmetis kaj gvidis la programon.

Fejfičová Magdaléna kaj S. Gaillard dum adiaŭa vespero /BÁN



Japanaj kongresanoj /BÁN



La tagon kaj la vesperon fermis la vesperpreĝo de Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS.

LUNDE

Post la matenmanĝo ni fermis la ĉi-jaran kongreson kaj adiaŭis unu la alian.

Ĝis la revido en 2019, en Hungario, ĉe la Balatono en Révfülöp dum la 69-a KELI kongreso, inter 10a kaj 17a de aŭgusto! (La detalojn kaj la aliĝilon vi trovas ĉi-numere.)

Ni multe dankas al Pavel POLNICKÝ kaj Jindra DUBINOVÁ por la belegaj tagoj kaj la senerara organizado! (sur apuda foto)



P. Polnický kaj J. Dubinová /BÁN

Fotantoj: VP – Václav Pospíšil, BÁN – Bengt O. Åradsson, REA – Ágnes Ráczkévy-Eötvös



PROKOKOLO

el la Jarkunveno de KELI 9. 8. 2018 en Poděbrady

1. La kunvenon malfermis prezidanto Philippe Cousson.
2. Estis elektitaj du protokolantoj: Hanna Cayzac kaj Oldřich A. Fischer.
3. Publikigita programo estis akceptita.
4. Komunikoj – salutoj al Jarkunveno de Els van Dijk, Vera Tuinder.
5. Per unu-minuta silento ni starante memorigis pasintjarajn mortintojn: Maj-Britt Kristoffersson kaj Ann Kristin Krondahl el Svedio, Pierre L. Ullman, David Richardson kaj William Goldsmith el Usono kaj Manfred Retzlaff el Germanio.
6. Sekretaria raporto de Pavel Polnický: nune venas nur escepte skribaj demandoj aŭ deziroj, korespondado estas reta. Plej grava estas zorgo pri aktuala listo de la abonantoj de Dia Regno (DR). Pasintjare li skribis leteron al ĉiuj, kiuj ne pagis kaj al tiuj, kiuj ricevas DR



senpage kun la peto reagi, se ili volas daŭre ricevadi ĝin. Venis nur kelkaj reagoj kaj ni ĉesis sendi DR proksimume al 25 personoj. Pasintjare li havis pli oftajn kontaktojn kun membroj rilate la preparata ekumena kongreso en Poděbrady. Ne estis finita inventuro de la stoko de niaj libroj, pro la sanstato de Els, kiu ne sukcesis kalkuli librojn en ŝia hejmo. Tiu tasko daŭras. Pavel Polnický partoprenis aktive diservon dum UK en Lisbono kaj kungvidis komunan kunvenon de IKUE + KELI samloke. Tie li membrigis junan geedzan paron el Kanado.

7. Raporto de kontistino Ágnes Ráczkevy-Eötvös estis publikigita en DR kaj ŝi nur klarigis kelkajn indikojn kaj respondis demandojn.
8. Karl H. Schaeffer raportis pri kaskontrolo, kiu konstatis ĉion en la ordo.
9. Diskuto pri tri raportoj kiuj estis poste aprobitaj.
10. Propono de buĝeto por 2019 kaj rezulto de 2017 estis ankaŭ en DR kaj post la diskuto ili estis aprobitaj.
11. Bengt O. Åradsson raportis pri redaktado de DR. Ofte mankas artikoloj kaj fotoj kaj tiam estas necese represi ion el pasintaj Dia Regno-numeroj aŭ aliaj gazetoj. Danke al Václav Lamr ni povas sur titolpaĝo publikigi liajn pentraĵojn kaj danke al Albrecht Kronenberger ni regule havas sur dorsa flanko

novan kanton. Dankegon al ili. Raporto estis aprobita.

12. Estrarelektoj. Ĉi-jare finis deĵorperiodo de Zoltan Somhegyi kaj Bengt O. Åradsson. Zoltan skribis, ke li pro la restado eksterlande, kie li eĉ ne povas partopreni skajpajn estrarkunvenojn kaj pro tio li ne plu volas esti en estraro. B. O. Åradsson estis reelektita por pliaj tri jaroj.
13. Kongresplano por 2019. Ágnes proponis organizi kongreson de KELI en Hungario, sed ne estis elektita loko el kelkaj eblecoj kaj la decidon faros estraro, surbaze de la baldaŭa konkreta propono.
14. Proponoj kaj sugestoj. Philippe Cousson demandis kiamaniere allogi kristanajn esperantistojn al KELI, Wolfram Rohloff opinias, ke por altigi la nombron de partoprenantoj de niaj kongresoj estas necese havi allogan *temon* kaj fari pli intencan reklamon. Samuel Gaillard informis pri aktivado en sia loka komunumo kaj Petr Chrdle menciis neceson uzi krom paperaj materialoj ankaŭ modernajn rimedojn.
15. Prezidanto Philippe Cousson fermis la kunvenon, kiun partoprenis 27 membroj.

Laŭ notoj de la kunprotokolantoj (nomojn vidu supre) protokolis Pavel Polnický.

☪

el la Latina tradukis Gerrit BERVELING, NL

li devas paŝti ŝafojn

5. Fine, pasinte grandan riveron, ni atingis la internon de l' dezerto, kie, laŭ la kutimo de tiu popolo, ni devis montri respekton al la mastrino kaj ties infanoj ; ni klinis la kapojn. Kvazaŭ estante kaptito, mi devis ŝanĝi la vestojn, t.e. mi devis lerni iri nuda, ĉar la varmeco estis tiel forta, ke mi ne povis porti ion krom por kovri la seksorganojn. Oni donis al mi kelkajn ŝafojn por paŝti, kaj pripensante mian mizeron, mi en tio trovis konsolon, ke la mastron kaj la kunsklavojn apenaŭ mi vidis. Mi pensis, ke mia sorto similas al tiu de Jakobo en la Biblio, kaj ankaŭ memoris pri Moseo ; ĉar ambaŭ foje estis paŝtistoj en dezertaĵo. Mi nutris min per freŝa fromaĝo kaj lakto, daŭre preĝadis kaj kantis la psalmojn, kiujn mi lernis en la monaĥejo. Mi ĝojis pri mia kaptiteco, kaj dankis al Dio, ĉar en la dezerto mi retrovis la monaĥon, kiun en la patrujo mi estis perdonta.

devigite li akceptas kunsklavinton kiel edzinon. Virto de la kaptita virino

6. Ho nenio iam ajn estas sekura kontraŭ la diablo ! Ho kiom buntaj kaj nekapteblaj estas liaj kaptiloj ! Eĉ en mia kaŝejo trovis min lia fienco. Kiam la mastro rimarkis, ke lia grego kreskas, kaj kiam li neniel trafis min ĉe trompaĵo

(mi ja sciis, ke la apostolo[28] ordonis ke oni obeu la mastrojn kvazaŭ obeante al Dio mem) kaj kiam li intencis kompensi min por des pli sekurigi mian fidelon al li, li donacis al mi la kunsklavinton, kiun oni kaptis samtempe kiel min. Kiam mi rifuzis, dirante ke mi estas kristano, kaj ke mi ne povas akcepti iun kiel edzinon dum ŝia edzo ankoraŭ vivas (samtempe kun ni estis kaptita ankaŭ ŝia edzo, sed alia mastro senindulge ekkoleris, tiris sian glavon kaj atakis min. Se mi ne tuj elstreĉus la brakon por posedpreni la virinon, li tuj surloke estus murdinta min.

Nokto pli malluma ol kutime ekvenis, kaj por mi tro rapide. En groton duonruinigitan mi kunportas la novan edzinon; tristo estis nia honora fraŭlino ; ambaŭ ni malemis al la alia, sed ni ne konfesis tion. Nur tiam mi vere eksentis mian sklavecon, kaj ĵetinte min planken mi priploris la monaĥon, kiun mi perdis, dirante :

« Ho kompatinda mi ! Ĉu por tio mi estis indulgita ? Ĉu miaj pekoj kondukis min ĉi tien, ke jam griziĝante mi – virga – fariĝu edzo ? Kiom helpis al mi, ke la gepatrojn, la patrujojn, la patran heredaĵon mi malestimis pro la Sinjoro, se nun mi devas fari, kion mi deziris eviti malestimante ilin ? – krom eble ke tion ĉi mi devas nun elteni, ĉar mi resopiris al la patrujo.

Kion ni faru, ho mia animo? Ĉu ni pereos aŭ venkos? Ĉu atendi la manon de la Sinjoro aŭ morti per propra armilo? Turnu la glavon al vi mem! Via morto, ho animo, estas pli timinda ol tiu de la korpo! Ankaŭ la savita ĉasteco havas sian martirecon. La atestanto pri Kristo kuŝu sentombe en la dezerto. Mem mi estos por mi mem persekutanto kaj martiro! »

Tion dirante mi tiris la glavon kiu brilis en la mallumo, direktis ĝian pinton al mi mem kaj diris:

« Saluton, malfeliĉa virino; havu min prefere kiel martiron ol kiel edzon. »

Tiam ŝi sin ĵetis al mi antaŭ la piedojn kaj diris:

« Mi priĵuras vin je Jesuo, mi petas vin je l' neceso de ĉi momento: ne verŝu vian sangon, ne ĵetu ties kulpon sur min. se la morton vi preferas, unue turnu la glavon al mi. Prefere tiel ni unuiĝu! Se mia edzo eĉ revenos al mi, mian ĉaston mi estus savinta, kiun mi lernis en kaptiteco; prefere mi mortus, antaŭ ol perdi ĝin. Kial vi mortu por ne unuiĝi al mi? Mi mortus, se vi dezirus tion. Havu min do kiel edzinon de ĉasteco kaj amu min pli en ligiteco anima ol vi povus korpe. La mastroj kredu, ke vi estas mia edzo; Kristo scias, ke vi estas mia frato. Facile ni konvinkos, ke ni estas geedzoj, kiam ili vidos kiom ni amas nin. »

Mi konfesas: mi estis mirigita. Mi admiris la virton de l' virino kaj nun ekamis ŝin pli kiel edzo. Tamen neniam mi rigardis ŝian nudan korpon, neniam ŝian karnon mi tuŝis, timante ke en paco mi perdos, kion en batalo mi savis. En

tia geedzeco pasis pluraj tagoj. La geedziĝo faris niajn mastrojn pli agrablaj por ni. Estis neniu suspekto pri fuĝo; foje eĉ tutan monaton en la dezertaĵo kiel fidinda paŝtisto mi povis resti for.

formikoj donas ekzemplon

7. Longe poste, dum sola mi sidis en la dezerto, nenion vidante krom ĉielo kaj tero, mi komencis mense ĉion pripensi, i.a. mi pensis pri miaj amikoj la monaĥoj kaj precipe pri la vizaĝo de mia patro, kiu edukis min, tenis min, perdis min. dum tiel mi pensadis, mi ekvidas procesion da formikoj, kiuj umadis sur mallarĝa padeto. Ŝarĝojn mi vidis pli pezajn ol iliaj korpoj. Kelkaj per la pinĉilo portis semojn de herboj, aliaj forigis humon el fosaĵo, aŭ haltigis akvo-vojetojn per baraĵoj. Kelkaj, pensante pri la venonta vintro, por ke ilia stokejo ne ŝanĝiĝu en herbejon per la malsekigita humo, fortranĉis la pintojn de l' enportitaj semoj, kaj aliaj sub multnombra luktado elportis korpojn de mortintoj.

Kaj kio estas eĉ pli mirige en tia procesio: la elirantoj ne ĝenis la enirantojn; male, se iun ili vidis fali sub fasko aŭ ŝarĝo, subigante la ŝultrojn ili helpis. Kial detaligi pli? Belan vidaĵon prezentis al mi tiu tago. Tiel, memorante, ke Salomono resendas nin al la diligenteco de l' formikoj kaj instigas nian maldiligentecon per ties ekzemplo [29], mi ekhontis pro mia sklaveco kaj eksopiris la ĉelojn de la monaĥoj. Mi deziris imiti la formikojn, kiuj laboras por la komuno kaj por kiuj, dum nenio estas ies propraĵo, ĉio apartenas al ĉiuj.

fuĝo

8. Kiam mi revenis al la ĉambro, venis mia edzino. Mia rigardo montris mian animan triston. Ŝi demandis, kio estas. Mi rakontis la kialon, kaj instigis ŝin fuĝi ; tion ŝi ne reĵetis. Mi petis ŝin silenti pri tio ; tion ŝi promesis. Ni daŭre nur flustris inter ni, inter espero kaj timo.

En la grego mi havis do tre belajn grandajn bokojn ; tiujn mi mortigis, faris trinkujojn el iliaj haŭtoj kaj preparis ilian viandon por survoje. Ĉe vesperiĝo kiam la mastroj pensis, ke ni retiriĝis por ripozo, komenciĝis nia vojaĝo, kun trinkujoj kaj parto de la viando.

Kiam la riveron ni atingis (estis ĉirkaŭ dek mejlojn diste) ni plenklovis la haŭtojn, ekkuŝis sur ili, kaj tiel ni konfidis nin al la akvo, malrapide piede pedalante, por laŭ la fluo kuntrenate longe for atingi iun lokon je la transa bordo, tiel ke la persekutantoj perdu niajn spurojn.

Sed intertempe la karno malsekiĝis kaj parte perdiĝis, kaj ni ne pli ol tri tagojn plu povis vivteni nin per ĝi. Ni trinkis ĝis satiĝo, prepare al estonta soifo. Tiam ni rapidis for, daŭre rerigardante – kaj nokte ni pli progresis ol dumtage : ĉu pro la embuskoj de vaste vagantaj Saracenoj ĉu pro la troa varmo de la suno. Mi kompatinda ! kvankam la menso komplete sekuras, tutkorpe tamen mi timtremas, dum tion ĉi mi raportas.

la mastro rekaptas la fuĝinton

9. Tri tagojn poste en krepuska distanco ni vidis, kiel du viroj sur kameloj plenrapide rajde alvenas. Antaŭ-

sentante malbonon, mi pensis ke nia mastro planas nian morton, kaj la suno por ni ŝajne nigriĝis. Ni terure ektimis, kaj ĝuste kiam ni komprenis, ke niaj spuroj en la sablo jam malkaŝas nin, ni trafis dekstraflanke iun groton, kiu etendiĝis longe subteren. Ni do eniris la groton, timante pri venenaj bestoj (vipuroj, baziliskoj, skorpioj kaj similaj estaĵoj ja kutime kaŝiĝas en tia ombraĵo kontraŭ la brula sunvarmo). Sed tuj ĉe la eniro ni serĉis ŝirmon en iu kavaĵo maldekstre ; ni apenaŭ kuraĝis paŝi plu, por ne, fuĝante la morton, trafi alian morton.

Ni pensis ĉe ni mem : Se la Sinjoro bonvolas helpi nin, ni saviĝis; se nin pekulojn li malŝatas, ni trovis nian tombon.

Kion vi pensas, ke ni sentis ? Kiom da timo : antaŭ la groto tute apude staris nia mastro kaj kunsklavo, kaj per niaj spuroj ili jam trovis nian kaŝejon ! Ho kiom pli aĉe estas atendi la morton ol efektive esti mortigita !

Mia lango ree balbutas kaj stumblas, kaj ŝajnas al mi ke ree la mastron mi aŭdas krei – apenaŭ mi kuraĝas fari sonon. La sklavon li sendas por fortiri nin el la groto. Mem li gardas la kamelojn, kaj kun elingita glavo li atendas nian alvenon. La servisto ĉirkaŭ tri aŭ kvar colojn progresis, kaj el nia kaŝejo ni vidis lian dorson, dum li ne vidis nin (ĉar tia estas la naturo de la okuloj, ke kiam post la suno oni eniras en mallumon, nenio estas videbla) – tiam sonis lia voĉo tra la groto :

« Elvenu, vi krimuloj ! Venu kaj mortu ! Kial vi atendas, kiel tie vi kaŝiĝas ? Venu ! Vokas vin la mastro ! »

Li ankoraŭ parolis kaj jen ! tra la obskuro ni vidis leoninon ataki la viron, mortigi lin kaj kuntreni lin sangokovritan pli internen. Bona Jesuo ! Kiel granda estis nia teruro, kiel granda nia ĝojo!

Sen ke nia mastro tion sciis, ni vidis nian malamikon pere. Kiam tiu konstatis, ke la alia prenas la tempon, kaj ke duopo eble povas rezisti, senpacienca en sia kolero, kaj la glavon ankoraŭ enmane, li venis al la groto, ekkriis kvazaŭ frenezulo, kritikante la malrapidon de l' sklavo kaj jam estis kaptita de la sovaĝa besto antaŭ ol li atingis nian kaŝejon. Kiu estus supozinta, ke sovaĝa besto antaŭ niaj okuloj batalu por defendi nin ?

Kiam estis forigita ĉi timo-kialo, restis ankoraŭ antaŭ niaj okuloj alia eble perejo – krom se eble leona furiozo estas malpli timinda ol homa kolero. Ni komplete timplenis, kaj apenaŭ kuraĝis moviĝi. Meze de tiel grandaj danĝeroj, sen ia ŝirmilo krom nia konscio pri ĉasteco, ni atendis kiel ĉio finiĝos. Frumatene la leonino, timante iun kaptilon kaj rimarkante, ke ŝi estas rimarkita, ekkaptis la ideton inter la dentoj kaj forportis ĝin, kaj lasis al ni la kaŝejon. Ni ne tuj sentis nin sekuraj, sed longe atendis antaŭ ol eliri ; ĉar plurfoje hezitante ĉu eliri, ni imagis al ni ke ni povos renkonti ŝin.

liberigite el la danĝeroj li reiras al la monaĥoj

10. Fine defalis de ni tiu timo, kaj kiam do finiĝis tiu tago, je ekvespero ni iris eksteren. Ni trovis la kamelojn, kiujn pro ilia granda rapideco oni nomas

dromedaroj[30] : kviete ili maĉis kaj redigestadis sian nutraĵon.

Ni surseliĝis, kaj fortigite de nova nutraĵo ni dek tagojn vojaĝis tra la dezerto ĝis fine ni atingis la Romian kampadejon. Oni portis nin al la tribunuso kaj ni ĉion raportis kio okazis. De tie ni pluvojaĝis al Sabiniano, kiu regis pri Mezopotamio, kie niajn kamelojn ni vendis.

Mia kara abato jam ripozis en la Sinjoro, kaj mi do iris al lia loko kaj dediĉis min al la monaĥa vivo ; mian kompaninon mi konfidis al la virgulinoj, ĉar kvankam mi amis ŝin kiel fratino, sed mi ne donis min al ŝi kvazaŭ al fratino.

Malĥo kiel oldulo rakontis tion ĉi al mi dum mia junaĝo. Nun, maljuna, mi rakontas tion ĉi al vi. Al ĉastaj historion pri ĉasteco mi dismetas. Virgajn homojn mi admonas konservi la virgecon. Vi raportu al la posteularo, por ke ili sciu, ke meze de glavoj, meze de sovaĝaj bestoj kaj dezertaĵoj la ĉasto neniam povas esti konkerita, kaj ke la homo kiu dediĉas sin al Kristo ja povas morti, sed neniam esti venkita.

☞

[28] = Paŭlo.

[29] Sent 6:6.

[30] La vorto dromedaro venas el Greka verbo kun signifo kuri.

La jena teksto de VIVO DE MALĤO, ankaŭ troviĝas ĉe Kristanaj Fontoj (Fontoj.net) en Trezoroj/Perloj de la literaturo. /Red

Du trezoroj surretaj

Kompilis Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Laŭtlekata Biblio

Certe vi memoras la projekton laŭtlegi la Biblion. La projekton iniciatis Ken CAVINESS ĉe Southern Adventist University. Pluraj volontuloj helpis lin pretigi la projekton.

Ĉu vi utiligis la eblecon kaj aŭskulti kaj samtempe legi la tekston? Sube vi vidas ekzemplon kiel ĝi aspektas. La ekzemplo estas el 1a Korintanoj.

Vizitu la jenan retpaĝon: esperantobiblio.org/




Kristanaj Fontoj

Alia grava fonto surreta estas la Kristanaj Fontoj, kiun vi devas esploru. La retpaĝaro estis malfermita en 2010 kaj respondecas pri ĝi Albrecht Kronenberger kaj Bernhard Eichkorn. Retestro estas Albert J. Urban ĉe la Liturgia Instituto de la Germana Episkopa Konferenco. Tie troviĝas, inter alie:

- Adoru kun melodioj
- Biblio, la tutan tekston
- Meslibro
- Trezorejo, kun
 - Perloj de la literaturo
 - Dia Regno, la numeroj post 2002, elŝuteblaj en pdf-formato
 - Kantu - kristanaj kaj nerelegiaj kantoj en Esperanto
 - k.t.p

La iniciantoj volas per la paĝaro instigi al spiritaĵ impulsoj por la ĉiutaga kristana vivo. ☞



1

▶ 0:00 / 0:44 ● ◀ ⋮

Paŭlo, vokita por esti apostolo de Jesuo Kristo per la volo de Dio, kaj Sostenes, nia frato, 2 al tiu eklezio de Dio, kiu estas en Korinto, al tiuj, kiuj estas sanktigitaj en Kristo Jesuo, vokitaj por esti sanktuloj, kune kun ĉiuj, kiuj en ĉiu loko vokas la nomon de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ilia Sinjoro kaj nia: 3 Graco estu al vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo.

▶ 0:00 / 0:53 ● ◀ ⋮

4 Mi ĉiam dankas mian Dion pri vi, pro la graco de Dio al vi donita en Kristo Jesuo; 5 ke en ĉio vi riĉiĝis en li, en ĉia parolo kaj ĉia scio; 6 kiel ankaŭ la atesto de Kristo konfirmiĝis en vi; 7 tiel, ke vi malatingas nenian donacon; atendante la malkaŝon de nia Sinjoro Jesuo Kristo, 8 kiu ankaŭ konfirmos vin ĝis la fino, por ke vi estu neriproceblaj en la tago de nia Sinjoro Jesuo Kristo. 9 Fidela estas Dio, per kiu vi estas alvokitaj en la kunulecon de Lia Filo Jesuo Kristo, nia Sinjoro.

Kristana Kongreso

69-a kongreso de KELI

10-17 aŭgusto 2019
en Révfülöp, Hungario

Karaj gefratoj,

hungaraj kristanoj denove kore invitas vin partopreni Kristanan kongreson en nia lando!

La urbeto Révfülöp situas 160 km sudokcidente de Budapeŝto, ĉe la norda bordo de nia belega, granda lago, Balatono.

En tiu ĉi malgranda urbeto funkcias la moderna konferenca kaj eduka centro de la hungara luterana eklezio, kiu estos nia kongresejo.

La bone ekipita kaj bela, ĉarma kongres-hotelo, kie kaj interne kaj ekstere ĉio, kio ĉirkaŭos nin, estas preta servi por nia bono. Ni petu nian Sinjoron por beno, kaj preparu niajn korojn por akcepti tiun benon!

En ĉi tia hejmo ni estos kune en la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu tion diras: „Ĉar kie du aŭ tri estas kune en mia nomo, tie en ilia mezo estas ankaŭ mi.” (Mateo 18,20 /traduko laŭ G. Berveling)

Ni proponas por temo de niaj meditadoj, preĝoj kaj interparoladoj dum la kongreso:

„... mi estis fremdulo kaj vi gastigis min.”

Mateo 25,35 (traduko laŭ G. Berveling)

Ni esperas vian partoprenon en tiu kristana kunestado.

Loka Kongresa Komitato

Dio benu!

ALIĜILO

Mi aliĝas al 69a KELI Kongreso 10-17 aŭg. 2019 en Révfülöp, Hungario

S-ro () / S-ino () Persona nomo:

Familia nomo:

Adreso:

Lando (en Esperanto):

Urbo/vilaĝo: Poŝtkodo:

Strato kaj numero:

Telefono:

Retadreso:

Mi estas membro de: IKUE () / KELI ()

Mi apartenas al la eklezio:

Mi deziras dividi la ĉambron kun:

Mi deziras loĝi sola: ()

Mi planas alveni je (dato kaj horo, se eblas):

Mi planas foriri je (dato kaj horo, se eblas):

Mi planas alveni per: aŭtomobilo (), trajno (), buso (), aviadilo ()

Mi estas vegetarano: () Mi bezonas alian dieton:

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:

Prelegon laŭ temo:

Programerojn por distra vespero:

Alian programeron:

La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo

Ĉiujn informojn pri la pag-eblecoj vi trovos en la alia flanko de aliĝilo

Dato: Subskribo:



Kongresaj kotizoj

Pageblaj en hungaraj forintoj (HUF) aŭ eŭroj (EUR)

Tarifo A: ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko

Tarifo B: ĉiuj aliaj landoj

Aliĝ-kotizo (ne repagebla) por ĉiu persono pagenda antaŭ la kongreso

ĝis 31 12 2018 **A:** 20,- EUR **B:** 40,- EUR

ĝis 31 03 2019 **A:** 30,- EUR **B:** 50,- EUR

post 01 04 2019 **A:** 40,- EUR **B:** 60,- EUR

Kongresa kotizo pagenda en la kongresejo:

A: 220,- EUR **B:** 280,- EUR

Krompago por unulita ĉambro: + 50,- EUR

NE-membroj de IKUE/KELI pagas laŭ Tarifo B

La kongreskotizo inkluzivas tranoktojn, manĝojn kaj ekskursojn

Grava atentigo! La menciitaj kotizoj inkluzivas neniun asekuron.

Ĉiu kongresano por kongresaj tagoj prizorgu por si la asekuron en sia lando.

La aliĝon oni traktos kiel validan post ricevo de aliĝ-kotizo!

Aliĝ- kaj kongres-kotizon oni povas sendi al la banka konto de:

RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes:

Ĝiro-nro (IBAN): HU59 1177 5070 1279 2889 0000 0000

SWIFT: OTPVHUHB

aŭ al la konto **kelk-p** de KELI ĉe UEA

aŭ al la konto de KELI ĉe CIC Lyonnaise de Banque en Francio:

KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale

Ĝiro-nro (IBAN): FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

SWIFT: CMCIFRPP

La aliĝilon sendu al:

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

Perletere: HU-1400 BUDAPEST, Pf.: 5.

E-mail: agnes@raczkevy-eotvos.com

Révfülöp estas bela malgranda urbeto ĉe la norda bordo de Balatono

Trajne aŭ buse: Al la fervojstacio de Révfülöp iras trajno el la budapeŝta stacidomo **Déli** (suda) el la budaa flanko de la ĉefurbo. Rektaj trajnoj iras plurfoje en ĉiuj horoj dum la somera sezono, kaj ankaŭ la rapidaj trajnoj haltas ĉe Révfülöp. Ankaŭ busoj iras ofte el la budapeŝta bus-ĉefhaltejo **Népliget** al la fervojstacio de Révfülöp. Nia kongresejo situas je du minuta promeno de la stacidomo.

Per aŭto sur la aŭtoŝoseo nro 7 (oni bezonas vinjeton!) oni devas iri 90 km de Budapeŝto ĝis Siófok, tie ŝanĝi al la vojo nro 71 kaj iri 70 km ĝis Siófok. El la okcidenta direkto vi devas iri al Győr, kaj de tie elekti la vojon nro 82/8/77/71 kaj tiel vi povas rekten iri al Révfülöp.

La kongresejo estas ege bela, nova hotelo, kiu estas la konferenca kaj eduka centro de la hungara luterana eklezio. La nomo de la hotelo estas **Ordass Lajos Evangélikus Oktatási Központ**.

La ĉambroj estas 1-2-3-4 litaj kun propraj banĉambroj (kun viŝtukoj) kaj necesejoj.

La eduka centro havas grandan belegan ĝardenon kun teraso. En komfortaj seĝoj kaj litoj eblas ĝui la belan ĉirkaŭan naturon.

La kongresejo havas modernan kuirejon, kaj ili estas pretaj servi manĝon al ĉiuj dietoj aŭ alergioj. En la hotelo mem estas kongres-salono kun 100 sidlokoj, ekipita de ĉiuj modernaj teknikaĵoj, kaj estas uzebla ĉie wifi.

En la ĝardeno troviĝas la loka luterana preĝejo, kiun ni povos uzi dum la tempo de la kongreso.

En la programo ni planas preĝojn plurfoje tage, prelegojn, komunajn kantadojn, muzikajn vesperojn. Ni ankaŭ planas tuttagan aŭtobusan ekskurson, ke ni povu montri al la partoprenantoj la interesajn historiajn vidindaĵojn en la ĉirkaŭaĵo.

Ne forgesu kunporti vian Biblion kaj vian Adoru-libron, ĉar tiujn ni uzos dum la kongreso. Kiu ne posedas nian ekumenan kantarono, Adoru, tiu povas aĉeti aŭ prunti ĝin en la kongresejo.

Vi akceptis per la apuda Aliĝilo la sekvantajn kotizojn:

Aliĝ-kotizo

ĝis 31 12 2018	A: 20,- EUR	B: 40,- EUR
ĝis 31 03 2019	A: 30,- EUR	B: 50,- EUR
post 01 04 2019	A: 40,- EUR	B: 60,- EUR

Kongresa kotizo

A: 220,- EUR **B:** 280,- EUR
Krompago por unulita ĉambro: + 50,- EUR
NE-membroj de IKUE/KELI pagas laŭ Tarifo B

Diversaj kulturoj en paca harmoni'

(originale verkita en Esperanto)



1. Di - ver-saj kul - tu - roj en pa - ca har - mo - ni'.
2. La or - do so - ci - a en ĝi - a kla - ra hel'!
3. De l' ŝto - na e - po - ko la ho - moj an - taŭ ni



Mal - sa - maj al - i - roj al u - nu sa - ma Di'.
La bo - no ko - mu - na - la plej su - pe - ra cel'!
kve - re - lis, ba - ta - lis, mi - li - tis in - ter si.



Re - spek - to, to - le - re - mo, bon - or - do en li - ber'.
La raj - toj ci - vi - ta - naj, sub - ten' kaj so - li - dar':
Su - fi - ças! Es - tas tem - po e - ten - di sin al pac',



Ti - e - le vi - vin - dos la viv' sur ni - a ter'.
Ti - e - le vi - vin - dos la vi - vo de l' ho - mar'.
al viv' en li - be - ro, en am', en Di - a grac'.

DIVERSAJ KULTUROJ EN PACA HARMONI' •
M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger
2018-08-08